Tango

La nomo Tango ŝajne devenas el lingvo de la afrikaj sklavoj en Ameriko, kiel ankaŭ la nomoj de parenca muziko milongo (*milonga*).

La nuna tango naskiĝis en la bordeloj de Montevideo kaj Bonaero, en la du lastaj jardekoj de la 19-a jarcento. Ĝin influis la muzikoj de la enmigrintoj venintaj el Italio kaj Germanio. Ĝi estis komence muziko de la plej malaltaj sociaj tavoloj, kaj la danco ankoraŭ montras trajtojn de la originloko.

En la komenco de la 20-a jarcento aperis la unuaj konataj komponistoj kaj muzikistoj. La unua tango kun konata aŭtoro estas *El entrerriano* (Tiu el *Entre Ríos*), de Rosendo Mendizábal, publikigita en 1898.

Iom post iom la tango modiĝis, kaj atingis pli altajn sociajn klasojn. Ankaŭ komenciĝis la internaciiĝo, precipe pere de la filoj de riĉaj familioj vojaĝantaj al Parizo. Ankaŭ la interpretistoj profesiiĝas kaj alvenas pli spertaj komponistoj.

La jaroj 20-aj kaj 30-aj fariĝas ora epoko por la tango. La ĉefa figuro estas Carlos Gardel, kiu famiĝis tutmonde. Li komponis grandan parton de la muziko de siaj tangoj, dum pri la tekstoj zorgis lia amiko Alfredo Le Pera. Iliaj tangoj fariĝis klasikaĵoj. Gardel partoprenis diversajn filmojn kaj kantis en Parizo kaj Novjorko. Post lia frua morto en aviadilakcidento en Medellín, Kolombio, li fariĝis mito por la argentinanoj.

Aliaj gravaj figuroj tiutempaj estis muzikistoj kiel Pascual Contursi, Juan Carlos Cobián, Julio de Caro, Osvaldo Fresedo, kaj kantistoj kiel Ignacio Corsini, Sofía Bozán, Rosa Quiroga aŭ Agustín Magaldi.

En la 40-aj jaroj la tango firmiĝis. Kvankam ĝi transiris al la riĉaj scenejoj, plu restis la popola karaktero, kaj la mito de la kvartaloj. Formiĝis diversaj orkestroj, kaj brilis la tekstoj de Enrique Santos Discépolo, Homero Manzi, Enrique Cadícamo, Cátulo Castillo kaj Osvaldo Pugliese.

Post ia stagno, alvenis renovigo de la tango. La plej konata figuro estas Ástor Piazzolla, tre influita de la modernaj kurentoj de la klasika muziko (interalie de Igor Stravinski kaj Béla Bártok), kiu tial suferis fortajn kritikojn de la puristoj.

Nuntempe estas ofta la mikso kun aliaj tipoj de muziko, kiel la ĵazo, la roko aŭ la elektronika muziko. Konataj grupoj estas Bajofondo Tango Club, Tanghetto aŭ Gotan Project, kaj muzikistoj kiel Adrián Iaies kaj la saksofonisto Miguel de Caro, inter aliaj.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Tango